

Babilada rondo

... okazos vendredon je la 19-a

la 26-an de oktobro

...**ĉe Gilbert Darbellay**

Ch. de l'Orme 6, 1054 Morrens
021 732 23 22 - 079 315 14 13



la 9-an de novembro

ĉe Knud et M.-Antoinette

la 23-an de novembro

ĉe Karlota

la 7-an de decembro

fonduo ĉe Francisko



Aliĝu rete ĉe :

<http://www.doodle.com/iffkkw7undkzfz8p>

Ŝaradoj

Lud' por turniro estas la unua,

Sukulenta planto estas la dua.

Se vi ĉion kune metos ...
kiel lupoj vi aspektos

Via solvo 1: seslitera vorto
al esperanto@citycable.ch



Dormolok' estas la unua,
Tempo-spac' - je la dua

Kaj la tria - zigurato.
Mia tuto estas arto
Pri la prozo kaj versaĵo.

Via solvo 2: deklitera vorto
al esperanto@citycable.ch

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte

Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: Francisko Randin *

076 411 14 55 - Kasisto.: Knud Sunier 021 961 38 56

Informilo

Novembro 2012 - n° 09

Lunde, la 5-an de novembro

je la 18^a30: ordigo en la ŝranko kaj je la 20^a:

Sébastien Moret klarigos al ni:

- *Kiel estiĝis prononca normo*

- *Esperanto kaj poŝtkart-kolekto*

Sabate la 15-an de decembro

Zamenhofa festo

***** 2013 *****

Lunde la 7-an de januaro

Decidota

Lunde la 4-an de februaro

Ĝenerala Asembleo

Lunde la 4-an de marto

Decidota


Lunde la 1-an de aprilo

Decidota

Lunde la 6-an de majo

Decidota

Laŭzana Esperanto - Societo



Rosario

Ĉiujare - somere - mi ferias ĉe mia familio apud Mesino. Mi bonĉancis renkonti kun la laŭzananoj kiuj veturis tra Sicilio al la itala kongreso. Mi invitis ilin en mia domo kiu situas 10 kilometroj sude de Mesino; mia naskiĝvilaĝo nomiĝas Lardereria. Ĉiuj el mia familianoj ĉeestis por saluti la 8 esperantistojn laŭzananajn. Ili preparis multe da kukoj kaj glaciaĵoj. Mi funkciis kiel tradukisto inter la diversaj lingvoj - siciliana, itala, franca, esperanta.

Poste, la 9 esperantistoj veturis al Mesino por viziti la urbon kaj asisti la feston religian de la 15-a de aŭgusto - La Ĉieliro de Maria - Vivu Maria - Vivu Maria - Vivu Maria. Ni eĉ grimpis en la turon de la katedralo por vidi la belegan panoramon sur la haveno.

Ni serĉis - sensukce - restoracion por manĝi pastaĵon. Ni do devis rezigni manĝi picon. Komenciĝis antaŭ la fino de la manĝo ... la piroteknikaĵoj. Ni do tuj rapidis paŝi al la haveno por vidi la duan parton.

Kun granda malplezuro mi devas adiaŭi ĉiujn, ĉar mi iomete ĵaluzis ilin, kiuj iros al la kongreso. Mi do reiris al mia vilaĝo atendante rakontojn kaj filmon de Francisko kiam ni kunsidos en Laŭzano.

Gilberto

Nia agrabla kaj sentreĉa ekskurso al Sicilio memorigas al mi sekajn lokojn « malpluvajn » kontraste al aliaj verdaj kaj fruktedonaj. Antikvajn urbojn ni vidis, multajn preĝejojn multe pli nombrajn ol ni povas viziti ... interesajn pro iliaj arkitekturo, dekoracio, ornamo, skulptarto, ktp.

Sed, ni ne devas forgesi nian celon ... Mazara del Valo ... en la granda hotelo Hopps en kiu ni trovis agrablan ĉambron komfortan. Ni manĝis en restoracio, profitis pri la naĝejo, ni sekvis kursojn, aŭdis prelegojn, spektis koncertojn, ktp. Mi vere kontentis pri la kongreso. Kaj ... kaj plie, la plej grava el ĉio estis la simpatia etoso kiu regis dum du semajnoj inter ni. Dankon al ĉiuj.

Monika

Italujo, kiel ili diras, Italio estas « normale » la spagetolando. Mi pensis tiel kiam mi preparis mian vojaĝon. ERARO.

Kie manĝi bonegan pastaĵon en Mesino? Post multaj serĉmarŝadoj, kuradoj, perdoj de kelkaj membroj de la grupo, eĉ kiam ni perdiĝis en la urbo ... ni finfine povis trovi seĝojn en la nura restoracio kiu proponas al la klientoj ... pastaĵojn ... ne picojn ... sed nur unugustajn. Adiaŭ al niaj revoj de saŭcoj diversaj ... sed kontenta trovi ion por manĝi. Ni atendos post nia reveno por manĝi per ... tra ... pri ... en la itala modo.

Moralo de tiu rakonto : vojaĝo instruas la malkovron kaj paciencon.

Ĝiulio

Mi rakontos al vi ... malbonan renkonton dum promenado.

En Agrigento, nia grupo deziris viziti la deziritan ĝardenon de Karlota. Ni do iris en la ĉirkaŭaĵon de la temploj por viziti tiun - dirite - belegan naturparkon en Sicilio.

Nia ŝoforo kaj « estro » Francisko malkovris la telefonnumeron de la ĝardena akceptejistino La virino klarigis nin pri la vojo por eniri la « paradizon » - duan straton dekstren, sur la ponto lasu la veturilon, ktp. Ni trovis ponton ... sed super la vojo. Nia ŝoforo haltis kaj mi decidis grimpi ŝtuparon - kvindekseks ŝtupojn - malantaŭ malfermita pordo verda. Mi vidis kelkajn ruinojn kaj unu el la multnombraj templo kaj du migdalajn arbojn. Sub la unua kuŝis du hundoj kiuj komencis montri malicajn dentojn. Mi tuj revenis al la veturilo ... « mia vosto inter miaj kruroj ».

Francisko

Mi parolos ĉi-tie nur pri la hotelo kaj la kongreso en Mazara del Valo.

Hotelo : Sur la panelo nia hotelo estis 4 stela, sur la tapiŝo en lifto estis 3 steloj kaj pro kialo de litpuloj ... mi donos al ĝi ... nur 1 stelon, vere malgrandan. La naĝejo estis fermita dum la duono de la tago. Ne eblis trinki ion ĉar preskaŭ la tutan tagon la trinkejo estis fermita.

La kongreso : Ĝus kiam ni alvenis, ni devis elpoŝigi multe da mono por pagi kaj la kongreso kaj la hotelo ... nur perbilette al la kasistino. La programo suferis de multe da ŝanĝoj ne anoncitaĵoj. Aŭ la prelegantino ne alvenis ... aŭ la alportanto de la filoj ne alvenis ... do la projekciado estis simple nuligita. Kaj pri la kursoj ... aŭ ili estis donitaj en varmegaj lokoj aŭ la klimatizilo ege malvamis la ĉambron ... la aparato estis fuŝita.

Amuza rakonto : Ĝus kiam ni finis kati la himnon dum la Solena fermo, la kongresanoj adiaŭis unu la aliajn kaj foriris kun valizoj ... tiam komenciĝis la kongreso de la konsekritaj, dediĉitaj kaj oferitaj virgulinaj. Ĉeestis nur virinoj de ĉiuj aĝoj kaj du « viroj » ... juna pastro bele vestita per griza kostumo kaj ĉefepiskopo maljuna ... ambaŭ gajaj kaj ridetantaj meze de la inoj.

Dank' al NI ĉiuj ... ĉio estis perfekta kaj neforgesinda, ĉar nia grupa etoso estis tiel amika. Dankon al la « ok-uloj ».



79° Congresso
di Esperanto in Italia
esperanto
Mazara del Vallo
18-25 agosto 2012